

ESPERANTO en INDONEZIO

neregula bulteno

numero 2

majo 2012

Propagandi Esperanton okaze de la datreveno de la Konferenco Azio-Afriko

Ilia Sumilfia Dewi



En la semajnfino de la 21a-22a de aprilo 2012, la E-klubo de Ĝakarta kaj Bandung kune laboris por propogandi Esperanton en la datreveno de la Konferenco Azio-Afriko en Bandung. Ni havis budon por informi la vizitantojn pri Esperanto ĝenerale kaj inviti ilin al la E-kurso okazanta en la muzeo. En la budo ni montris E-librojn, revuojn kaj informojn pri la E-movado en aliaj landoj.

La temo de la datreveno de la Konferenco Azio-Afriko ĉi-jare sufiĉe rilatas al la ideo de la E-movado: "Festu kunecon en paco". La Esperanta budo, kiu funkciis de la 10a matene ĝis la 6a posttagmeze, interesis homojn, kiuj antaŭe ne sciis, kio estas Esperanto. Ili opinias ke Esperanto similas al la hispana aŭ aliaj latinidaj lingvoj.

Partoprenu en la Indonezia Esperanto-Kongreso!

Ĝoje kaj kore la indoneziaj esperantistoj invitas eksterlandajn samideanojn partopreni en la unua Indonezia Esperanto-Kongreso, de la 19a ĝis la 22a de aprilo 2013 en Bandung. Ĝi okazos en la Muzeo pri la Konferenco Azio-Afriko, kie en aprilo 1955 okazis la tiel nomata Bandung-konferenco de la nealianciĝintaj landoj de Azio kaj Afriko, kaj la Kongreso okazos laŭ invito de la direktoro de la Muzeo ĝuste okaze de ĝia datreveno. La nuna funkcio de la muzeo estas edukado al paco kaj kunlaboro, kaj do bone kongruas kun la celoj de Esperanto. La loka E-klubo "Ruĝa formiko" estas unu el la kluboj kiuj trovis lokon en tiu muzeo. Unu el la celoj de la kongreso estas konigi Esperanton en la urbo kaj alia estas kunigi la esperantistojn el la tuta lando por krei landan asocion.

La indoneziaj esperantistoj esperas bonvenigi multajn eksterlandanojn. Estos eblo partopreni antaŭ- kaj postkongresajn ekskursojn, sed ilia daŭro ankoraŭ ne fiksiĝis kaj dependas ankaŭ de la interesiĝo montrata al ili. Pliaj informoj estos aldonitaj laŭ la tempo en <https://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/kongreso>. Donacoj por la okazigo de la kongreso bonvenas ĉe la UEA-konto **ies-a-p**.

Sabate posttagmeze mi kaj Abdul Haris ankaŭ havis renkontiĝon kun kelkaj personoj, kiuj ŝatis scii pli pri Esperanto. Ili demandis kiel oni povas havi lecionojn de Esperanto kaj kiuj estas la utiloj lerni la lingvon; ili petis ankaŭ informojn pri la gramatiko ktp. Kelkaj diris ke ili ŝatus lerni kune kun la E-klubo en Bandung.

Tiu agado estis sufiĉe sukcesa por propagandi Esperanton al la publiko; almenaŭ pluraj homoj jam scias ke ekzistas internacia lingvo, kiu estas utila kaj facile lernebla, kaj tio ja estas grava por la E-movado en Indonezio.

Pada akhir pekan tanggal 21-22 April 2012, klub Esperanto Jakarta dan Bandung bekerjasama untuk memperkenalkan Esperanto pada hari ulang tahun Konferensi Asia-Afrika di Bandung. Kami membuat stand untuk memberikan informasi kepada para pengunjung tentang Esperanto secara umum dan mengajak mereka untuk mengikuti kursus Esperanto di museum. Di stand, kami menunjukkan beberapa buku Esperanto, majalah-majalah Esperanto dan informasi tentang gerakan Esperanto di negara lain.

Tema dari hari ulang tahun Konferensi Asia-Afrika tahun ini cukup berhubungan dengan ide gerakan Esperanto; "Merayakan Kebersamaan dalam Perdamaian". Stand Esperanto yang mulai dibuka pada jam 10 pagi sampai jam 6 sore telah menarik beberapa orang yang sebelumnya tidak mengetahui apa itu Esperanto. Mereka kira Esperanto mirip dengan bahasa Spanyol atau bahasa latin lainnya.

Aktivitas tersebut cukup berhasil untuk memperkenalkan Esperanto ke publik, paling tidak orang telah mengetahui bahwa ada bahasa internasional yang berguna dan mudah dipelajari dan hal ini juga penting untuk gerakan Esperanto di Indonesia.

Ĉi tiu bulteno ekzistas danke al la volontula laboro de sindediĉaj esperantistoj en Indonezio kaj Eŭropo. Neniu el la kunlaborantoj/kunredaktantoj ricevas ajnan financan (aŭ alispecan) rekompencan pro sia laboro. Kaj tamen la bulteno ne estas tute senkosta: presi kaj dissendi ĝin ne estas senpage. Ĝis nun la presado kaj dissendo povis okazi pro la malavaraj donacoj de subtenantoj, al kiuj ni publike dankas ĉi tie. Jen la listo de la ĝisnunaj donacintoj (en kronologia ordo): Ionel Oneț, Nikola Rašić kaj Mila van der Horst-Kolińska el Nederlando, Yasuo Hori el Japanio kaj membroj de la Amsterdama E-Rondo (Nederlando). Dezirantoj subteni nin finance povas fari tion donacante al la UEA-konto **ies-a-p**, kun la mencio "bulteno". Dankon al la donacintoj kaj antaŭdankon al la donacintoj!

Se vi volas finance subteni la partoprenon de indoneziaj esperantistoj en la ĉi-jaraj UK kaj IJK, bonvolu kontakti: redakcio-ideo@googlegroups.com.

La teamo de **Ĝ en I**

Agrabla sperto kun Pasporta Servo

Ilia Sumilfia Dewi



Viziti belajn lokojn, sperti novajn aferojn, renkonti agrablajn homojn, ktp eble estas kelkaj celoj kiujn oni havas kiam oni vojaĝas. Por iuj homoj, vojaĝado estas hobbio aŭ parto de vivpasio kun personaj celoj. Por mi, vojaĝo estas hobbio kaj ankaŭ vivpasio. Mi komencis vojaĝi kiam mi estis studento en la mezlernejo kaj pro tio mi daŭrigis la studadon en la turisma fakoj. Mi pli ŝatas mem organizi la vojaĝplanon kaj serĉi informojn pri la vojaĝceloj en la reto kaj ĉe

amikoj aŭ vojaĝgrupoj. Ofte dum mi faras tion, mi imagas ke mi jam komencis la vojaĝon.

Kiam mi vojaĝas, mi ĉiam esperas konatiĝi kun lokaj homoj kaj sperti iliajn ĉiutagaĵojn. Pro tio mi tre interesiĝis kiam mi aŭdis pri Pasporta Servo. Fakte antaŭ 3 jaroj mi jam aniĝis en simila komunumo, kiu nomiĝas Couchsurfing. De tiu komunumo oni havas sufiĉe bonajn avantaĝojn dum vojaĝado. Oni povas tranokti ĉe iu senpage, aliĝi al lokaj aktivaĵoj kaj viziti belajn lokojn malofte konatajn de kutimaj turistoj. Tamen ekde kiam mi parolas Esperanton, mi trovis ke Pasporta Servo donas al mi pli da avantaĝoj. Mi konatiĝis kun samideanoj kaj spertis agrable ilian ĉiutagan vivon.

Tio okazis kiam mi vojaĝis tra Eŭropo ĵus aliĝinte al Pasporta Servo. Unue mi konatiĝis kun Vlasta, kiu loĝas en Prago, Ĉeĥio. Ŝi havas agrablan familion kaj la membroj de la familio parolas Esperanton. Mi restis ĉe ŝi dum tri tagoj kaj ŝi agrable helpis min dum mia vizito, kvankam ŝi devis labori ĉiutage. Tamen mi trovis nenium malfacilaĵon, ĉar la familio donis sufiĉe da gravaj informoj por ke mi esploru la urbon sola. Poste mi daŭrigis mian vojaĝon kun Pasporta Servo al Vieno. Mi serĉis disponeblan membron ĉe la reto de Pasporta Servo, kaj trovis unu. Pro la malfrua respondo, bedaŭre mi ne sukcesis resti ĉe li, tamen ni havis mallongan agrablan renkontiĝon kaj babilis pri niaj Esperanto-spertoj. Mi dankas lin pro lia helpo daŭrigi mian vojaĝon al Budapeŝto. En Budapeŝto, mi renkontis Imre, kun kiu mi konatiĝis en la Universala Kongreso en Kopenhago. Li gastigis min kaj montris al mi la belajn lokojn de la urbo kaj prezentis la E-movadon en Hungario. Mi konatiĝis ankaŭ kun kelkaj komencantoj kiuj lernas Esperanton kun li. Estas mirinde kiom multe da homoj en Hungario ŝatas lerni la lingvon, eĉ per privata kurso.

Finfine mi renkontis ankaŭ Hans kiu loĝas en Esperanto-Domo, en Maastricht, Nederlando. Ni konatiĝis en la UK kaj li bonvenigis min en sian urbon. Mi spertis multajn interesajn aferojn dum mia vizito, precipe ĉar antaŭe mi ne havis ideon pri tiu urbo. Afable li montris al mi belajn lokojn kaj interesajn ĉiutagaĵojn, kaj li estis mia vojaĝamiko al aliaj landoj. Fakte li jam estas membro de Pasporta Servo de pluraj jaroj kaj gastigis multajn esperantistojn. Mi ege dankas lin pro la belaj spertoj; kun li mi konatiĝis kun la agrabla familio de István en Luksemburgo, renkontis E-grupojn en Antverpeno kaj vizitis mian amikino Heidi en Bruĝo.

Kvankam tiuj spertoj okazis antaŭ pluraj monatoj, ili restas bone en mia memoro. Konatiĝi kun agrabla samideano per Pasporta Servo jam donis avantaĝon al mi, ne nur rilate vojaĝkostojn, sed, pli ol tio, Esperantan amikecon, kiu ankaŭ plibonigis mian lingvonivelon. Mi nomas mian sperton "Vojaĝsperto kun Esperanto".

Bagi sebagian orang melakukan perjalanan adalah hobi atau kepuasan pribadi dengan tujuan pribadi pula. Bagi saya melakukan perjalanan adalah hobi dan juga hasrat pribadi.

Saya lebih suka mengatur sendiri rencana perjalanan saya dengan mencari informasi melalui internet atau pengalaman teman-teman.

Saat melakukan perjalanan saya selalu berharap mengenal orang-orang lokal, dan mengalami keseharian mereka. Untuk itu saya sangat tertarik saat mendengar tentang Pasporta Servo yang mirip dengan komunitas 'Couchsurfing'. Dari komunitas tersebut saya memperoleh keuntungan selama melakukan perjalanan. Seseorang bisa mendapat tempat menginap gratis, bergabung dalam kegiatan-kegiatan lokal, dan mengunjungi tempat-tempat yang indah yang jarang diketahui oleh turis umumnya. Namun setelah menggunakan bahasa Esperanto, saya menemukan bahwa Pasporta Servo memberikan saya lebih banyak keuntungan. Saya mengenal teman-teman Esperantis dan mengalami keseharian mereka.

Selama perjalanan saya di Eropa dengan menggunakan Pasporta Servo, www.pasportoservo.org, saya mulai mengenal teman-teman Esperantis melalui situs tersebut dan memiliki pengalaman yang menarik dan menyenangkan dengan mereka bahkan dengan keluarganya. Dengan Pasporta Servo, saya bukan hanya bisa menghemat biaya perjalanan melainkan lebih dari itu, Persahabatan Esperantis dan juga membantu saya semakin lebih mahir menggunakan bahasa Esperanto. Saya namakan pengalaman tersebut sebagai 'Pengalaman Perjalanan bersama Esperanto'.

Novajoj el Batam

Mi estas ĝoja informi ke nun en Batam pli da homoj scias, kio estas Esperanto. En marto mi komencis enkonduki ĝin al la junuloj de mia preĝejo. Ĉar ili montris intereson ni decidis studi ĉiun sabaton. Mi uzas lecionojn de kelkaj Esperantaj retejoj, kiel ekz. lernu.net kaj disdonis al ili la librojn kiujn mi portis el Eŭropo. Mi ĝojas ke du el la amikoj en la klubo pretis verki ion pri siaj impresoj rilate Esperanton. Mi estas nun verkanta mian disertacion, kiu temas ankaŭ pri Esperanto. Sekve nun kvar el miaj lekciistoj scias pri Esperanto. Bedaŭre mia intenco instrui Esperanton al miaj lokaj amikoj en Couchsurfing ne prosperis, malgraŭ la bona komenco. **Endang Sabrina**

"Hundo" estas la plej facila vorto kiun mi povas memori kaj ĝi estas la plej unua vorto kiun mi aŭdis kiam mi komencis lerni Esperanton. Kial ne "Saluton"? Ĉar mi malfruis por la unuaj mallongaj lecionoj de Heidi Goes antaŭ du jaroj. Do kiam mi alvenis en la kurson, ĉiuj jam lernis la alfabeton kaj por mi la unua vorto estis "hundo". Mi tre bedaŭras ke en tiu tempo mi povis iri nur al la unua E-leciono. Nun,

kun mia amikino Sabrina mi daŭrigas la lernadon de E-o, kiu okazas kelkfoje kun aliaj amikoj en nia klubeto de Couchsurfing. Bedaŭre estante tro okupitaj ili ne havas sufiĉan tempon por kunlerni. Sekve mi mem lernas Esperanton rete. Dume mi ekamikiĝis kun aliaj esperantistoj per Facebook kaj lernu.net. **Undi Mahasih**

Saluton, mia nomo estas Friska kaj mi estas instruistino. Mi estas nun lernanta Esperanton kun aliaj amikoj en ĉambro apud nia preĝejo. La unua kiu kondukis min al Esperanto estas Endang Sabrina. En la komenco Esperanto estis tute fremda lingvo por mi, ĉar mi ne konis ĝin. Sed post kiam ŝi prezentis ĝin al ni en malgranda grupo, mi estis tre surprizita kiel bela ĝi estas. Do mi sentis min interesata kaj mi aliĝis al la klaso, kiu studas ĉiun sabaton. Mi ŝatas studi Esperanton, ĉar ĝi estas multe pli facila ol la angla. Do mi daŭrigas la lernadon. Bedaŭre ni ne havas sufiĉe da vortaroj, sekve ni devas kunuzi tiujn de Sabrina. Mi esperas ke iam mi povos paroli Esperanton kiel ŝi.


Friska Sihombing


Bahasa Esperanto di Google


Bobby Mulyadi

Siapa yang tidak mengenal website Google? Google membantu kita mencari segala macam informasi yang diinginkan (berupa website, gambar, dokumen, dan sebagainya) dengan cara memasukkan kata kunci. Selain itu, Google juga memiliki fasilitas-fasilitas lainnya yaitu email (Google Mail – Gmail), Google Earth, messenger (Google Talk), jaringan pertemanan (Orkut & Google Plus), alat penerjemah, dan sebagainya.


Alat penerjemah di Google merupakan kamus online yang berfungsi untuk menerjemahkan dari sebuah bahasa ke bahasa lainnya dan sebaliknya. Sekitar tanggal 22 Februari 2012, Google menambahkan bahasa Esperanto di dalamnya. Beberapa keistimewaan alat penerjemah ini meliputi:

- Penerjemahan dapat dilakukan tidak hanya per kata, tetapi juga per kalimat bahkan per paragraf.
- Menampilkan hasil terjemahan alternatif. Anda bahkan dapat mengklik pada bagian hasil terjemahan untuk mengedit dan melihat terjemahan alternatif.
- Suara (untuk mendengarkan cara pengucapan) tersedia pada sebagian besar bahasa, Anda dapat mengklik  untuk mendengarkannya.

- Untuk bahasa dengan abjad non-latin, penulisan secara fonetik ditampilkan, contohnya bahasa Cina (Mandarin) dengan mengklik .

- Tersedia pula rating terjemahan dengan cara mengklik .

Langkah-langkah untuk menggunakan Google terjemahan ialah sebagai berikut:

- Ketik www.google.com atau www.google.co.id.
- Dari beberapa tulisan di bagian atas halaman, klik kata “terjemahan”.
- Tentukan/pilih bahasa yang ingin diterjemahkan, misalnya bahasa Esperanto.
- Tentukan/pilih bahasa tujuan untuk hasil terjemahan, misalnya bahasa Inggris.
- Ketik kata-kata yang ingin Anda terjemahkan, misalnya “Mi ankaŭ amas vin”.
- Lihat hasil terjemahan “I also love you”.
- Tukar bahasa terjemahan (dari bahasa Inggris ke bahasa Esperanto) dengan cara mengklik .

Alat penerjemah Google mendukung huruf alternatif bahasa Esperanto saat kita menggunakan huruf-huruf spesial, tetapi kita tidak tahu cara mengetiknya. Misalnya saja “Mi loĝas en Ĝakarto” dapat diketik dengan “Mi loĝas en Gxakarto” atau “Mi loĝas en Ghakarto”.

Pertemuanku dengan bahasa Esperanto

Erlangga Femayuga

“Esperanto? Bahasa negara mana itu?” mungkin bagi kita sebagai Esperantis pertanyaan seperti itu tidaklah asing atau bahkan kita terkadang masih kesulitan dalam menjawab pertanyaan orang-orang yang tidak tahu bahasa Esperanto. Memang patut disadari bahwa gerakan Esperanto Indonesia masih dapat dikatakan kurang dapat dikenal oleh masyarakat. Umumnya orang yang mengenal bahasa Esperanto adalah orang yang memang sangat cinta bahasa dan sudah mengenal bahasa lain sebelumnya.

Kehidupan saya yang dikelilingi para akademisi bahasa maupun teknik menjadikan diri saya ditarik dalam dua disiplin ilmu pengetahuan yang secara umum berbeda, yang satu mengandalkan logika sistematis, sedang yang lain mengandalkan naluri dan hafalan. Teman-teman saya sesama mahasiswa teknik terkadang menyebut saya “nyeleneh” karena memiliki hobi mempelajari bahasa yang jarang didengar ditelinga mereka. Mereka sering sekali bertanya “emang bahasa anu dipakai didunia kerja?” Entahlah, yang jelas saya menyukai hobi saya itu.

Sebelum saya mengenal Esperanto, saya telah mengenal bahasa asing lain. Seperti bahasa Rusia dan Jepang, satu kesimpulan yang saya dapat, bahwa semua bahasa yang saya pelajari, lebih sulit daripada bahasa Inggris, hingga saya berkesimpulan sangat tepat bahwa bahasa Inggris adalah bahasa persatuan dunia. Saya ingat betul bagaimana kompleksnya hanya untuk membentuk jamak dalam bahasa Jerman atau bagaimana menyesuaikan kata benda dalam kasus-kasus gramatikal sebagaimana halnya bahasa Finlandia dan Hungaria.

Kira-kira saat kelas 2 SMA, saya sudah mulai mengenal bahasa Esperanto secara tidak sengaja lewat browsing di internet, ada kesan tersendiri yang sangat membedakannya daripada bahasa natural lain, bahasa Esperanto sangat mudah bila dibandingkan bahasa-bahasa lain. Semua tata bahasa sangat simpel hingga saya menem-

ukan satu kunci dalam mempelajari Esperanto, pelajarilah tata bahasa yang diperlukan dan dari situ seringlah berlatih dalam menggunakannya. Tidak seperti bahasa Rusia, Jerman atau Prancis dimana sudah banyak wadah untuk mengekspresikan bahasa-bahasa tersebut, saya mempelajari Esperanto ibarat orang bisu; menulis, berpikir dan bergumam sendiri dalam bahasa Esperanto. Tiada kolega yang mengarahkan, tiada guru yang mengajari. Semuanya didapatkan dari sumber pelajaran di internet.

Bagi saya, perkembangan bahasa seperti ini hanya membuat saya menjadi seorang *dumb speaker*. Hanya mengerti kata-kata bahasa Esperanto tapi tidak dapat mengutarakannya secara lisan. Hingga pada saat saya lulus sekolah dan berkuliah di Bandung, saya mulai mengenal para Esperantis di dunia maya, disitulah pertemuan awal saya dengan Esperantis, untuk pertama kalinya saya mempraktikkan apa yang saya pelajari dengan para Esperantis, hingga saya memutuskan untuk mengikuti kongres Esperanto tahun ini, dengan harapan dapat memberikan manfaat besar bagi perkembangan Esperanto saya.

Saya sungguh sangat senang menjadi bagian dari gerakan Esperanto Indonesia, semakin tumbuh dan kembanglah gerakan bahasa ini!

Kiam mi estis en la dua jaro de la mezlernejo, mi konatiĝis kun Esperanto. Mi lernis Esperanton kiel mutulo: nur skribe kaj pense, sen ajna helpo. La lecionojn mi prenis el la interreto. Mi komprenis Esperanton, sed ne povis paroli. Mia unua renkontiĝo kun aliaj esperantistoj okazis kiam mi aliĝis al la E-klubo en Ĝakarto, kaj tiam unufoje mi ekzercis mian Esperanton.

Tanggal terakhir untuk kirim artikel buat buletin yang berikut adalah 15 Oktober. Kalau mau menjadi anggota redaksi buletin ini, atau mau kirim artikel buat buletin yang akan datang, tolong kirim pesan ke redaksi: redakcio-ideo@googlegroups.com.

La limdato por la sekva bulteno estas la 15a de oktobro. Se vi emas iĝi membro de la redakcio de ĉi tiu bulteno aŭ volas kontribui ion, mesaĝu al la redakcio: redakcio-ideo@googlegroups.com.

Tre konciza biografio de la unuaj dek unu jaroj de samideano

Wim Posthuma

Jam de la 1970aj jaroj mi revas revidi mian naskiĝlandon Indonezio kaj speciale Centran Javon. Mi esperantistiĝis en la sepdekaj jaroj en Svedio kaj pro tio mi pensis korespondi kun indonezia samideano. Sed mi ne sukcesis, ĉar mi ne trovis iun ajn.

Okaze de la UK en Jokohamo mi renkontis Hazairin Junep. Imagu kiel feliĉa mi estis. En 2008 mi invitis lin al la UK en Roterdamo kaj regaligis lin per vojaĝo tra Belgio kaj Nederlando. Estis tre bona tempo. Ni vizitis interalie kelkajn muzeojn rilatajn al la kolonia tempo de Indonezio, kiam tiu lando nomiĝis *Nederlandsch Indië* kaj Jakarta estis Batavia.

Sed nun mi volas prezenti min. Mia nomo estas Wim kaj mi naskiĝis en 1935 en Salatiga, kie mia patro estis la ĉefinstruisto de la bazlernejo. Kiel la aliaj *totoks* ankaŭ ni havis geservistojn. Estis ĉefe mia fratino (en la apuda foto, la staranta knabino; mi estas la knabo en la brakoj de la servistino), ne mia patrino, kiu iris kun Koki al la bazono por butikumi. Pro tio mia fratino scias pli da esprimoj en la malaja ol mi. Mi esperas lerni iom pli dum mia vizito en Indonezio kaj ankaŭ pro la fakto ke mi interrilatas kun indoneziaj samideanoj antaŭ la ĉi-jara UK.

Venis la jaro 1942, kiam la nederlanda registaro kapitulacis antaŭ la japana reĝimo post mallonga milito. Mia patro estis malliberigita, ĉar li defendis la kolonion, kvankam li ne estis soldato.

Fine de 1942 multaj *orang blanda* estis senditaj al internigejoj en Ambarawa kaj aliaj lokoj en la arkipelago. Komence la vivo estis sufiĉe bona tie, estis manĝaĵoj kaj ni povis "kavati" (*kawat* = drato kiel limo

de la internigejoj) kun lokanoj kaj aĉeti iom pli da manĝaĵoj. Ekde tiam ni estis gastoj de la imperiestro Hirohito, diris la komandanto. Sed fakte li estis torturisto kaj ne nia gastiganto, kiam ni devis resti kliniĝe sub la suno dum horoj. Alvenis pli kaj pli da enloĝantoj en la naŭ tiajn internigejojn en Ambarawa kaj eĉ en Banjubiru. Sed la kvanto da manĝaĵoj ne kreskis pro tiu kreskado de enloĝantoj. Ni devis dormi tre kunpremitaj kaj la vivkondiĉoj estis tre malbonaj. Mi aŭdis ke ili estis eĉ pli malbonaj por tiuj kiuj restis ekster la internigejoj. La malsanoj abundis. Ekzemple mia patrino estis malsana 20 monatojn. Mia fratino (12-jara) devis deĵori, ekz. gardopromeni nokte.

Pro la faligo de la atombombo en Nagasaki, finfine la 15an de aŭgusto 1945 Japanio kapitulacis. Tiu terura bombo tamen savis la vivojn de multaj en la kolonioj de la sud-orienta Azio.

La *bersiab*-periodo kiu sekvis estis tre danĝera por multaj el ni. La familioj devis rapide fuĝi. Tio fakte ne estis facila, ĉar ne plu restis sufiĉe da ŝipoj por transporti nin for de la arkipelago. Post atendado, interalie en Semarang, miaj patrino, fratino kaj frato kaj mi ŝipe iris al Tajlando, kie mia patro atendis nin. La japanoj sendis lin kun multaj aliaj militkaptitoj al Tajlando por konstrui la konatan fervojon al Birmo. En Tajlando ni vivis duonjaron atendente transporton al Nederlando. Tie mi iris al provizora lernejo. La infanoj havis grandajn truojn rilate la lernejan instruadon, ĉar ĝi estis

malpermesita dum la japana periodo en Indonezio.

En Nederlandon mi alvenis kiam mi estis 11-jara kaj tie vizitis lernejojn.



Hi semua,

Apa kabar? Saya berharap kabar kalian semua baik. Saya Asfrina Liola, tapi nama kecil saya Lio. Saya tahu bahasa Esperanto dari Kak Iliia Sumilfia Dewi, dan saya mulai bergabung dan belajar Esperanto di klub Jakarta "Esperiga suno" pada bulan Februari 2011. Kesan pertama saya tentang belajar bahasa Esperanto adalah bahasa yang mudah dimengerti, saya pikir tata bahasanya seperti gabungan dari berbagai bahasa (Jepang, Jerman, Perancis, Spanyol) dan saya pikir itu adalah bahasa persahabatan dunia. Terbukti, dari beberapa video yang saya lihat tentang bahasa Esperanto dan orang esperantis. Mereka dari berbagai negara, saat berkumpul bersama-sama dapat berbicara dengan menggunakan bahasa Esperanto. Jadi, mereka tidak harus kesulitan untuk belajar bahasa negara dari esperantis masing-masing. Cukup untuk berbicara bahasa Esperanto, dapat berkomunikasi.

Dan ini adalah pertamakalinya saya untuk benar-benar melihat fakta "Bahasa Esperanto" dengan kedatangan Tatjana Loskutova pada bulan Agustus 2011 (*lihat foto disebelah kanan*). Ibu Tatjana Loskutova bekerja sebagai guru bahasa profesional di salah satu sekolah unggulan di kota Ivanovo, Rusia. Saya sebagai orang Indonesia, dan Tatjana sebagai orang Rusia. Kita dapat berkomunikasi atau berbicara dalam bahasa Esperanto. Tanpa saya harus terlebih dahulu belajar bahasa Rusia. Karena pekerjaan saya, saya hanya bisa bertemu ibu Tatjana satu hari. Namun, pertemuan itu cukup berkesan bagi saya. Terima kasih banyak, ibu Tatjana Loskutova telah datang ke Indonesia. Terima kasih banyak, telah mengajarkan kami

untuk membaca puisi *Ho, mia kor'*, menceritakan kebudayaan dari negara Rusia dan kalender dari Rusia dan kartu pos dari Rusia. Dan, kata-kata yang paling saya ingat dari Ibu Tatjana Loskutova adalah "Apakah Anda mengerti?". "Apakah Anda mengerti?" "Hehehehe..." Sampai Berjumpa Kembali ibu Tatjana Loskutova".

Ini adalah motivasi bagi saya untuk terus belajar Bahasa Esperanto. Dan suatu hari saya benar-benar dapat melihat sendiri begitu besar bahasa Esperanto dengan mengikuti Kongres Esperanto dan bertemu dengan esperantis dunia.



Mi aliĝis al la E-klubo "Esperiga suno" en Ĝakarta en februaro 2011, kiam mi komencis lerni la lingvon. Mi trovis la lingvon facile komprenebla, kaj la fakto ke ĝi enhavas elementojn de diversaj lingvoj faras ĝin eĉ pli internacia. Mia

unua kontakto kun eksterlanda esperantisto estis kiam s-ino Tatjana Loskutova el Rusio vizitis nin kaj donis al ni lecionojn. Mi daŭre lernas la lingvon kaj esperas iam partopreni en internacia Esperanto-aranĝo. **Asfrina Liola**

“Esperiga suno” ĉiam ĝojas bonvenigi vin

Abdul Haris

Di bulan pertama tahun 2012, klub Esperanto Jakarta “Esperiga suno” sudah dua kali menyambut kedatangan beberapa tamu esperantis dari luar negeri. Meskipun kedatangan mereka bukan untuk mengajarkan bahasa Esperanto – karena mereka bukan guru – melainkan hanya untuk melancong ke berbagai tempat wisata di Indonesia, namun kami tetap senang hati menyambut mereka karena itu adalah momen yang tepat untuk melatih kemampuan bercakap-cakap kami. Selama ini, para anggota klub “Esperiga suno” hanya belajar tata bahasa dan memperbanyak kosakata. Untuk percakapan bisa dibilang sangat kurang.

Pada tanggal 5 Januari 2012, Nino Vessella dan istrinya dari Italia mengunjungi Jakarta setelah menghabiskan perayaan tahun baru di Bali. Bertempat di salah satu pusat perbelanjaan di Jakarta, yang juga kami gunakan untuk pertemuan rutin setiap dua minggu, kami menyambut mereka dan lalu makan malam bersama. Karena saat itu hujan cukup deras maka anggota klub yang datang tidak cukup banyak, hanya tiga orang (*lihat foto disebelah kanan*). Selama makan malam kami berbicara hanya dalam bahasa Esperanto. Saya dan teman-teman dari klub tidak dapat berbicara bahasa Italia dan sebaliknya Nino serta istrinya tidak dapat berbicara bahasa Indonesia. Kami berbicara mengenai banyak hal: negara mereka, kunjungan mereka ke Bali dan lain-lain.

Esperantis kedua dari luar negeri yang juga sempat mengunjungi klub kami adalah Hans Adriaanse dari Belanda. Dia juga datang ke Indonesia hanya untuk melancong. Untungnya Hans mengunjungi kami di hari Minggu, persis di mana kami memang mengadakan pertemuan rutin sehingga banyak anggota klub yang datang. Umumnya mereka masih malu-malu berbicara dalam bahasa Esperanto dengan orang asing namun mereka tetap mencoba meski terbata-bata dan harus sering membuka kamus. Sebagai tanda persahabatan, Hans memberi kami sebuah pulpen bertuliskan “Esperanto Domo”. Terima kasih banyak atas pulpennya Hans. Jika ada esperantis lain yang kebetulan mengunjungi Jakarta, walau pun hanya untuk melancong atau untuk urusan bisnis, kami selalu siap menyambut Anda sekalian.



En la unua monato de la jaro 2012, la Ĝakarta Esperanto-Klubo “Esperiga suno” dufoje bonvenigis eksterlandajn esperantistojn. Kvankam iliaj vizitoj ne estis por instruado – ĉar ili ne estas instruistoj – sed nur por vojaĝo al kelkaj turismaj lokoj en Indonezio, ni same elkore ĝojis bonvenigi ilin. La klubanoj uzis la okazon por praktiki sian Esperanton. La 5an de januaro 2012, du italaj geesperantistoj, Nino Vessella kaj lia edzino, vizitis nian klubon post sia vizito en Balio por la novjara festo. Pro la forta pluvo tiuvespere, nur 3 klubanoj venis (vidu la foton ĉi-supre). Ni kune vespermanĝis kaj parolis nur Esperanton, ĉar la klubanoj ne parolas la italan kaj Nino kaj lia edzino ne parolas la indonezian. La 22an de januaro 2012 ni ricevis la viziton de alia eksterlanda esperantisto, Hans Adriaanse el Nederlando. Li vizitis la klubon dimanĉe kiam la klubanoj kunvenis por lerni Esperanton kune. Kiel amikecan donacon Hans disdonis globkrajonojn kun la surskribo “Esperanto Domo” sur ili. Ni ĉiam pretas kaj ĝojas bonvenigi aliajn esperantistojn. Kontakto nin sufiĉe frue por povi aranĝi renkontiĝon. Bonvolu esti niaj gastoj.

Esperanto Sebagai Bahasa Uni Eropa?

Penggunaan mata uang tunggal Eropa ternyata tidak diikuti dengan penggunaan bahasa tunggal untuk komunikasi di lingkup Uni Eropa. Terdapat 23 bahasa resmi di Eropa yang menyebabkan dibutuhkannya ribuan penerjemah dan alih bahasa yang menghabiskan sekitar seperempat milyar Euro per tahunnya.

Di Eropa dikenal adanya bahasa Esperanto yang sampai saat ini masih diusulkan oleh beberapa orang untuk dijadikan bahasa dalam lingkup Uni Eropa. Bahasa Esperanto yang dikembangkan oleh Dr. Ludwig Lazarus Zamenhof, seorang Yahudi kelahiran Białystok di masa kerajaan Rusia, direncanakan penggunaannya di masyarakat luas di Eropa sejak akhir abad ke-19. Ketua Persatuan Esperanto Eropa, Seán Ó Riain, yang bekerja sebagai pengalih bahasa Irlandia di komisi Uni Eropa berpendapat Esperanto sangat teratur dan mudah dipelajari.

Namun penggunaan bahasa Esperanto sebagai bahasa kedua di Uni Eropa masih menjadi pertentangan bagi sebagian parlemen di Eropa. Mereka lebih mendukung penggunaan bahasa Inggris, walaupun cenderung bahasa Inggris yang buruk.

Kenyataannya banyak artikel di internet ditulis dalam Esperanto bukan dalam bahasa anggota Uni Eropa. Dengan Esperanto, semua anggota Uni Eropa bisa menggunakan bahasa yang sama. Misalnya ketika menyanyikan himne Eropa dalam bahasa Esperanto.

Sumber:

<http://www.kabarindonesia.com/berita.php?pil=12&jd=Esperanto+Sebagai+Bahasa+Uni+Eropa%3F&dn=20120208231611>
<http://www.dw.de/dw/article/0,,15720476,00.html>



En julio ĉi-jare Heidi Goes refoje instruos Esperanton en Indonezio kaj samtempe iom esploros en bibliotekoj kaj intervjuos veteranojn. La itinero enhavos minimume Jakarta, Bogor, Bandung kaj Yogya. Ĉiuj informoj pri datoj kaj lokoj troveblas en nia retejo <https://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/kalendaro>, kaj dum la vojaĝo aperos novaĵoj en la tiea blogo. Se vi volas subteni la vojaĝon, ĝiru al la UEA-konto **ies-a-p** kun la mencio: “Instruvojaĝo Heidi”. Antaŭdankon!

Sekelumit Cerita Tentang “Ruĝa formiko”

Muhammad Fadil Mauludi

Fad, kuota untuk kelas Esperanto sisa dua bangku lagi. Minat? Begitulah kira-kira pesan singkat dari seorang sahabat pada Jumat pagi, 22 Juli 2011. Saya yang sedang mengendarai motor, langsung membalas pesan tersebut dengan satu kata, tiga huruf: oke.

Yang dimaksud oleh sahabat saya dengan kelas Esperanto adalah acara “2 Hari Kursus Bahasa Esperanto”, yang diselenggarakan pada 23-24 Juli 2011. Acara tersebut memang sudah dirancang beberapa waktu sebelumnya oleh Museum Konferensi Asia-Afrika, seiring dengan rencana kedatangan seorang esperantis asal Rusia, Tatjana Loskutova. Itulah awal ceritanya saya mengenal Bahasa Esperanto, yang di kemudian hari saya ketahui sebagai bahasa artifisial untuk mempersatukan bangsa-bangsa.

Singkat cerita, dalam dua hari kursus tersebut, Tatjana Loskutova berhasil memikat saya untuk menyukai Bahasa Esperanto. Kosakata-kosakatanya yang mudah dihafalkan dan banyak kesamaan cara pengucapan dengan Bahasa Indonesia, lalu tata bahasanya yang sederhana, ditambah cara mengajar Tatjana yang sangat menyenangkan, membuat saya tertarik mempelajari lebih dalam Bahasa Esperanto. Sayangnya, dua hari adalah waktu yang sangat kurang untuk mempelajari sebuah bahasa, sesederhana apapun itu. Namun, agar peserta kursus dapat terus belajar, Tatjana mewariskan dua judul buku, yaitu *Mamutido Miĉjo* dan *Kunci Esperanto*.

Pada Oktober 2011, mulailah saya beserta 5 teman lainnya yang juga mengikuti kursus Tatjana, berkomitmen membentuk kelompok belajar mandiri, bermodalkan dua buku warisan Tatjana. Kelompok belajar inilah yang menjadi cikal bakal klub Esperanto Bandung, “Ruĝa formiko”.

Mulai Maret 2012, klub “Ruĝa formiko” resmi membuka seluas-luasnya penerimaan anggota untuk belajar Esperanto bersama-sama. Di klub yang bermarkas di Museum Konferensi Asia-Afrika ini, metode belajarnya tentu berbeda dengan kursus dari Tatjana. Dengan prinsip ‘sama-sama belajar’, masing-masing peserta saling berbagi ilmu, saling mengisi, di mana saya dan 5 teman tersebut bertindak sebagai pendamping.

Dengan dukungan materi pelajaran serta dukungan semangat dari Tatjana sendiri, juga dari para esperantis seperti Heidi Goes (Belgia), Ilia Sondang dan Abdul Haris (Jakarta), klub “Ruĝa formiko” telah berjalan selama dua bulan dengan relatif lancar. Klub yang pertemuannya diadakan setiap Sabtu-Minggu ini, dihadiri oleh sekurang-kurangnya 25 peserta tiap pekan.

La E-klubo “Ruĝa formiko” en Bandung ja aktivas. Ni esperas ke la klubo longe ekzistos kaj ke la nombro de lernantoj pligrandiĝos. Mi esperas ankaŭ ke la klubo daŭrigos la lernadon, por ke ni povu komunikiĝi kun homoj en la tuta mondo. Multan dankon al la personoj kiu helpis nin!

Montessori kaj Esperanto en Indonezio

En la Montessori-lernejo en Ĝakarta oni instruas Esperanton. La lernejo estas jam dulingva – indonezia kaj angla – sed la komunumo vidas valoron en la lernado de lingvo, kiu estas vere regebla jam en la fruaj jaroj de lernado, kaj kiu donas eblon al internaciaj amikeciloj kaj al pliklarigo de gramatikaj konceptoj.

Mi vizitis la lernejon en 2011 por subteni la programon kaj renkonti la lernantojn. Tio estis tre bela sperto kaj la infanoj estis feliĉaj lerni Esperanton, eĉ dum la feriperiodo.

En marto ĉi-jare mi faris prezenton pri la valoro de Esperanto en la frua instruado, al ĉirkaŭ 90 partoprenantoj de la tute nova Asocio de Indoneziaj Montessori-Lernejoj, kaj ĝi estis bone akceptita. Kelkaj instruistoj nun konsideras, ĉu sekvi la ekzemplon de la Montessori-lernejo en Ĝakarta.

La profesia lingvisto D-ro Anna Dall laboros en Ĝakarta en 2013 kaj intencas fari raporton pri la progreso en la Montessori-lernejo en Ĝakarta. Aliaj esploristoj en Bangkoko, Tajlando, atentos ŝian raporton, ĉar en oktobro ĉi-jare ili komencos E-enkondukan projekton tie, kun infanoj kiuj ankoraŭ ne konas la anglan.

Tiu ĉi projekto bezonas tradukon de la instrumaterialoj en la tujan, kio nun estas farata. La traduko en la indonezian estas komencita de Reza Pahlevi, sed, ĉar li estas tre okupita, helpo estas bezonata.

Se vi volas proponi Esperanton al lernejo en Indonezio, la retejo www.MontessoriEsperanto.org eble estas utila. Se vi havas ideojn pri aldonindaj menciindaĵoj, bonvolu kontakti min.

Penny Vos (penivos@yahoo.com)

Menciinde

- Ĉi tiu bulteno estas la unua Esperanto-periodaĵo de/por indoneziaj esperantistoj en la nuna jarcento. La elektronika versio troviĝas ĉe: <http://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/bulteno>.
- Pro sukcesa agado por disvastigo de Esperanto en Indonezio, la belga esperantistino Heidi Goes ricevis de UEA, kadre de la pasintjara UK, **Diplomon pri elstara agado**. La 18an de novembro 2011 ŝi prelegis pri la nuntempa E-movado en Indonezio en la antverpena E-klubo “La Verda Stelo” kaj la 10an de decembro samjare ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago pri la historio kaj la nuna E-movado en Indonezio. La 1an de februaro 2012 ŝi mallonge prelegis pri la sama temo por la Brusela Esperantista Grupo.
- Ankaŭ Wim Baris parolis pri Indonezio kadre de kunveno de la Amsterdama Rondo, la 15an de aprilo 2012.
- La poemaro de Yohanes Manhitu *Sub la vasta ĉielo* (vidu la paĝon 6 en la provnumero) ricevis pozitivan mension en *EAB Update* n-ro 55 (oktobro-decembro 2011), p. 8. Recenzo pri ĝi aperis en *Beletra Almanako* n-ro 12 (oktobro 2011), pp. 121-124. En la sama eldonaĵo publikigis ankaŭ kvin poemoj verkitaĵ de Yohanes en la davana lingvo kaj tradukitaĵ de li mem en Esperanton.
- Kadre de la pasintjara Universala Kongreso prezentiĝis en la Internacia Arta Vespero programero el Indonezio, kiu spekteblas ĉe: http://www.youtube.com/watch?v=hLKBoQS_Rog.
- Ĉe <http://www.podkasto.net/2011/10/20/la-74a-elsendo/> aŭskultebles intervjuo kiun Ilia Sumilfia Dewi donis al la retransmisio Varsovia Vento.
- Sangat kaya informasi dan bermanfaat adalah materi yang Eddy Roesdiono munculkan di blogonya: <http://bahasa.kompasiana.com/2011/05/27/esperanto-dicurigai-bahasa-komunis-kini-bahasa-gaul-dunia/>. Contohnya layak diikuti!
- Interesaj estas la blogo kaj la Facebook-paĝo de Noersal Samad: <http://bahasagauldunia.blogspot.com/>, <http://www.facebook.com/noesakandomaradjo>.